RAPORTO PRI AGADO de Esperanto-kluboj en periodo 2023/24,
tio estas inter la konferencoj en Prudká 28.9.-1.10.2023 kaj Česká Třebová 27.-29.9.2024

Sian raporton sendis kluboj Benešov, Brno, Česká Třebová, Havířov, Karlovy Vary, Mladá Boleslav, Olomouc, Opava, Ostrava, Písek, Praha, Prostějov, Ratíškovice, Svitavy, Třebíč,
Esperanto grupo E-mental, Pardubice kaj memstara Esperanto-organizo AEH, katolika sekcio IKUE, sekcio de nevidantoj kaj duonblinduloj LIBE, Pedagogia komisiono, Traduka grupo, Grupo por ciferecigado

**E klubo Benešov** – la anoj kunvenadas ĉiun paran merkredon, ĉiun malpaparan ĵaŭdon du esperantistinoj, aninoj ankaŭ de praga E klubo, vizitadas tiun ĉi.
Oktobre 2023 oni aranĝis prelegon pri Esperanto en Urba biblioteko Benešov.
La anoj partoprenas en diversaj aranĝoj de aliaj kluboj.
Informas: L.Chaloupková 22.9.2024

**E klubo Brno** – tre aktiva. La kunvenoj okazadas ĉiusemajne merkrede, foje persone en klubejo, foje rete. La retaj kunvenoj estas registrataj kaj troveblaj je ju-tubo. La klubo kunlaboras kun pola E klubo Glivice. Oni preparas prelegojn pri diversaj interesaj temoj.
Printempe 2023 Milan Kolka gvidis E kurson - finis 3 personoj kaj retan kurson kunlabore kun ĈEA – finis 6 personoj. Ambaŭ kursoj pasis laŭ lernolibro Esperanto per rekta metodo de Stano Marček.
La klubanoj partoprenas diversajn E aranĝojn, eĉ eksterlandajn – 109-a UK en afrika Arušo.
Publikado: Mir. Malovec: Poŝvortaro Esperanto-ĉeĥa kaj ĉeĥa-Esperanto, eldonis KAVA-PECH
Oldřich A. Fischer: El mirinda mondo de kaktoj, propra eldonaĵo
Kunlaboro kun Moravia landa biblioteko: ĝi akceptis librojn kaj ĵurnalojn en nombro de 5000 eroj, ĝis nun lokigitaj en loĝejo de Mir. Malovec.
Informas: M.Kolka 1.9.2024

**E klubo Amikeco Česká Třebová** – la anoj kunvenas neregule. Du anoj preparis kunlabore kun ĈEA konferencon en Česká Třebová, 27.-29.9.2024, je adreso: Domov mládeže Střední škola technická a dopravní, Habrmanova 1540.
Informas: Ilona Bauerová 27.9.2024

**E klubo Havířov** – la klubanoj kunvenadas en diversaj societaj ejoj kaj ofte kune vizitadas kulturajn ekspoziciojn de fotoj, bildoj kaj aliaj artefaktaĵoj. Junie 2024 oni aranĝis Esperanto fajron en bela naturo ĉe Aerodromo Josef Hoza, kun ovofritaĵo kaj kolbasetoj.
Informas: Zdeněk Heiser 20.9.2024

**E klubo Karlovy Vary** – la anoj kunvenas neregule. Unu klubano partoprenis ŝakturniron „Esperantistoj“ je platformo leeches.com
Informas: M. Bloudek 26.9.2024

**E klubo de Doktoro Hradil, Mladá Boleslav** – aktiva klubo. Oni organizas ĉiusemajne kunvenojn malfermitaj ankaŭ por publiko en Komunuma centro Klementinka.
Publikado: Legaĵoj XIII. kaj XIV., propra eldonaĵo. Artikoloj en E ĵurnaloj
Sumoo legado – aktivas 15 legantoj
Prelegoj: por publiko en Urba biblioteko pri vojaĝado kun Esperanto. Kunlaboro kun amatora aktorino St. Hošková, prezentanta (en la ĉeĥa) tekstojn de esperantistino-aktorino Eva Seemannová pri iamaj signifaj ĉehinoj.
Reta adreso: www.labutipirka.cz – E artikoloj, kantoj, prelegoj
Informas: J.Drahotová 23.9.2024

**E klubo** Olomouc – la klubanoj kunvenadas ĉiujaŭde posttagmeze, dediĉas sin al traduko de E tekstoj kaj aŭksultado de retaj E prelegoj. La anoj partoprenas en aranĝoj de aliaj E kluboj.
Informas: J.Machačík 4.9.2024

**E klubo Opava** – laŭleĝe la klubo ekzistas kun 8 membroj, fakte en Opava estas nur 2 klubanoj, kiuj de tempo al tempo kunvenadas, la aliaj vivas ekster la urbo, eĉ fremdlande. Laŭ sia sanstato unu ano vizitas E konferencojn de ĈEA.
Informas: Vl. Kočvara 6.9.2024

**E klubo Ostrava –** aprila 2024 vizito de redaktorino de Ĉeĥa radio Ostrava en la klubejo kaj registrado de interparolo pri Esperanto,
aprila ĉeesto de anoj en e-mentala aranĝo Ĝuu Esperanton.
maja aranĝo de geedzoj Suchánek – „ovofritaĵo“ en Frýdlant nad Ostravicí – 14 anoj,
aŭgusta ĉeesto de unu anino ĉe Uko en afrika Arušo,
julia „kunveno“ de ostravaj klubanoj kaj aliaj esperantistoj ĉe sepulto de neatendita forpaso de Jaroslav Suchánek
Informas: L.Němec 19.9.2024

**E klubo La Ponto Písek** – la klubo ne aranĝas kunvenojn pro alta aĝo de la klubanoj, sed daŭre kulturas kontaktojn inter ili. La prezidantino de la klubo prizorgas informajn mediojn, helpas ĉe preparo de novaj retpaĝoj de E muzeo en Svitavy, prilaboras ciferecigadon de arkivaj materialoj, preparas kelkan programon por E klubo de Prago.
Unu klubanino efektivigas registadon de E artikoloj por nevidantoj por ĵurnaloj Revuo Esperanto kaj Monato.
Informas: Pavla Dvořáková 22.9.2024

**E klubo Praha** – aktiva klubo. Junie 2024 efektiviĝis translokiĝo de E klubejo Ve Smečkách al nova adreso: Revoluční 5, Praha 1, la transloĝigon prizorgis kelkaj klubanoj, septembre okazis unua kluba renkontiĝo en la nova klubejo.
Ĉiun neparan ĵaŭdon pasas klubaj kunvenoj kun interesa programo – prelegoj je diversaj temoj, kantado ĉe gitaro aŭ ukulele, prezentado de lumbildoj kaj rakontado pri vojaĝoj eksterlanden,
Zamenhoftago ĉe E ŝtono, antaŭkristanska kunveno en klubejo,
maja babilado kun verkisto Martin Petiška pri verko de lia patro Eduard kaj de li, prezento de noveldonita, en Esperanton tradukita libro Golemo,
septembra prelego de ukraina fotografo kaj vojaĝanto Evgen Kovtonjuk pri UKo en Arušo.
Trifoje jare la prezidanto kompilas kaj eldonas kluban Bultenon.
Informas: T.Břicháček 18.9.2024

**E klubo Prostějov –** la klubaj kunvenoj pasas ĉiun jaŭdon en nova klubejo sur placo de T.G.Masaryk 1. Dum la jaro oni sendis al klubanoj, anoj de proksimaj kluboj kaj distrikta preso kaj Starto informojn pri kluba agado,
la klubanoj partoprenas aranĝojn de ĉirkaŭaj E kluboj. Ili organizis propran aranĝon okaze de 115-a datreveno de la E klubo en Prostějov, partoprenis 6 esperantistoj,
la klubo havas retpaĝojn kun informoj pri kluba agado kaj fotoj de diversaj aranĝoj.
Informas: J.Liška 30.8.2024

**E klubo Ratíškovice** – la klubo ne organizas regulajn kunvenojn. Januare 2024 oni efektivigis jarkunvenon kaj junie ĉeeston ĉe „Falĉo-tago“.
Decembre 2023 geedzoj Vyšinek kunlabore kun E klubo Svitavy organizis Marcipanan Kristnaskon en E klubejo Svitavy,
junie geedzoj Melichárek partoprenis ekskurson al Orlica Montaro kun svitavaj klubanoj.
Informas: J.Melichárková 22.9.2024

**E klubo Svitavy. Klubo de geamikoj de Esperanto** – aktiva klubo, memstara jura subjekto. Oni efektivigis 41 aranĝojn, kelkajn pli ol unu tag-daŭrajn, eĉ ekskursojn eksterlanden,
Marcipanan Kristnaskon kaj Paskofeston,
oni propagandas Esperanton ĉe prelegoj en lernejoj bazaj kaj mezlernejoj dum Tago de lingvoj, Tago de muzeoj, prelegoj en Hejmo de pliaĝuloj, paroĥejo.
Instruisto sinjoro Richtr, kunlaborante kun la klubanoj, organizas prelegojn – Vojaĝaj vesperoj, pro tio oni aĉetis jam duan dataprojektilon.
Krom klubaj kunvenoj pasas tri E kursoj.
Ĉiujare oni kompilas aktualan fotolibron-kronikon de la klubo.
La klubo havas proksimajn rilatojn al Urba muzeo kaj informas publikon urban kaj Esperantan pri sia agado, oni havas siajn FB paĝojn kaj interretan paĝaron,
sinjorino Čumová sindone zorgas pri muzea biblioteko kaj Libroservo.
Informas: L.Dvořáková 26.9.2024

**E klubo Třebíč** – la klubo ne havas kunvenojn, sed oni prizorgas ĉiujaran organizon de origine nomata Somera Esperanto Tendaro en Lančov, nuntempe Somera Tendaro de Esperanto kaj aliaj mondaj lingvoj. Pasas nur kursoj de aliaj lingvoj, ĉar por Esperanto oni havas nek interesatojn, nek instruistojn. La organizantoj, krom ordigo de la tendarspaco, kelkfoje dum la jaro kontrolas la tendaron.
Komence de julio, kiel ĉiujare, oni organizis finsemajnan kunvenon de iamaj tendaranoj.
Informas: O.Lacinová 20.9.2024

**Esperanto-recesia grupo E-mental´** - tre aktiva. La anoj de la grupo organizis tre sukcesan aranĝon Ĝuu Esperanton en Brno, Pardubice, Ostrava, Česká Třebová, Šumperk, Svitavy kaj Benešov,
januare festis 25 jarojn de E-mental´en Velké Pavlovice,
februare vizitis bestĝardenon, kie oni protektas hipopotaminon Emička,
maje tre sukcese partorenis pragan aranĝon "Kuro por PARAPLE" virtuale kaj persone,
partoprenis en praga aranĝo Briko - Helpu helpi; la anoj aĉetis 40! brikojn kaj ornamis ilin per surskribo ESPERANTO, la aranĝon vizitis  eĉ prezidento Petr Pavel,
vojaĝis al Gratz (pli poste Grazanoj vizitis E-mentalanojn en Prago)
organizas aliajn aranĝojn, dum kiuj oni konversacias en Esperanto kaj trejnas ĝin ĉe diversaj amuzaĵoj; per sia agado faras propagandon de Esperanto por publiko.
Informas: Vlasta Pištíková 10.9.2024

**E klubo Pardubice-Rondeto de Dr.Schulhof + AEH** – tre aktivaj. Ambaŭ organizaĵoj tuŝapude kunlaboras. La tutan jaron prezidantino de la klubo transmetadis E librojn kaj materialojn de subtegmento en laborĉambron, ordigis ilin kaj kompilis liston de ili – helpis klubanoj. La liston oni sendis al E biblioteko en Svitavy. Interesatoj povas mendi – laŭ la listo – kiun ajn libron.
La kunvenoj de ambaŭ organizaĵoj pasas en loĝejo de la prezidantino du foje monate.
Marte 2024 efektiviĝis aranĝo de E-mental´kaj la klubo – Ĝuu Esperanton,
maje la klubanoj partoprenis en aranĝo Multikultura Semajno en Příhrádek.
Jam de longe oni strebas por lokigo de tabuleto kun Esperanta teksto sur arbon, kiu iĝos Eseranto arbo. Oni atendas decidon kaj konsenton de urba konsilantaro.
Ĉiumonate la AEH eldonas kaj dissendas (eĉ eksterlanden) Informilon kaj 4 foje jare ĝian aldonaĵon Antaŭen – redaktorinoj estas M.Kosnarová kaj L.Srbová. Kontribuoj de interesaj artikoloj estas bonvenataj.
La klubanoj helpis forigi lignajn budojn en ĝardeno de la prezidantino por konstruigi pergolon kun firma tegmento por estontaj ĝardenaj E kunvenoj.
La rondeto kunlaboras kun Jiří Altior, malproksima parenco de Dr.Schulhof, fondinto de Instituto de renesanca heredaĵo.
Informas: M.Kosnarová kaj L.Srbová 1.+18.9.2024

**Katolika sekcio IKUE** – de 17.6., laŭ postulo de la sekcio – ĝi estis forigita de societa registro kaj iĝis sekcio de ĈEA, sekcio sen jura subjektiveco.
La sekcio havas nun 24 membrojn – la nombro malaltiĝas pro forpaso de la anoj, pro malbona sanstato kaj simile.
De la jaro 1991 la sekcio eldonis kvaronjaran paperan ĵurnalon Dio Benu, kiu aperas jam 34 jarojn. De la jaro 2023 ĝi aperas interrete. De komenco ĝis nun redaktas ĝin M.Šváček, prezidanto de la sekcio. Oni vane serĉas homon por plua agado de la sekcio kaj por redaktado kaj eldonado de la nun reta Dio Benu.
La anoj de la sekcio ne kunvenadas persone, sed komunikas rete, ankaŭ partoprenas en klubaj kunvenoj de E klubo Přerov.
La sekcio havas retpaĝaron www.ikue.org/cz, kiu enhavas numerojn de Dio Benu, arkivon de la ĵurnalo de la jaro 1991, Praktikan Kompendion kun ĉiuj kantoj kaj melodioj el Dio Benu, diversajn artikolojn, enhavon de ĵurnalo Espero Katolika.
Informas: M.Šváček 1.8.2024

**Sekcio de nevidantoj kaj duonblinduloj – LIBE**
Ne efektiviĝas personaj kunvenoj, tamen la anoj de la sekcio aktivas.
Geedzoj Jelínek – sinjoro Jiří – redaktas ĵurnalon Aŭroro, kiu estas eldonata en Breilla skribmaniero, laŭtlegante registras geedzoj Karaš. Krome sinjoro Jelínek kontrollegas la ĵurnalon de LIBE „Esperanta Ligilo“, kiun presas praga biblioteko kaj presejo.
Fine de la jaro 2024 finiĝos eldonado de la ĵurnalo Aŭroro pro financaj malfacilaĵoj kaj ankaŭ foresto de la abonantoj. La sinjoro estas komitatano de LIBE, la anoj komunikas per interrero.
La anoj de la ĉeĥa sekcio planas 2 kunvenojn de blindaj kaj duonblindaj esperantistoj dum la UKo en Brno 2025.
Informas: Jan Příborský 10.9.2024

**Pedagogia komisiono**
Milan Kolka efektivigis retan E kurson por komencantoj; skriban E kurson gvidas M.Tomečková – venis 5 aliĝiloj.
Informas: J. Melichárková 22.9.2024

**Traduka grupo**
Ĝi aktuale ne funkcias, sed Pavla Dvořáková planas prepari seminarion de temo „Eluzo de artefaritaj tradukiloj kaj artefarita iteligenco“ lige al la sama temo dum KAEST 2024. En propono estas preparo de diversaj materialoj, antaŭ ĉio ĉiĉeronaj aŭ aliaj, laŭ postuloj de organizantoj de UKo Brno 2025.
Informas: Pavla Dvořáková 22.9.2024

**Grupo por ciferecigado**
La kvar kunlaborantinoj ciferecigas iamajn ĵurnalojn – Praga Bulteno, Verda Familio (de Mnichovo Hradiště), Bulteno  Haná, Jeseníky; Bulteno Laborista Ligo en Ĉeĥoslovakio; Verda Voĉo el Doksy.
M.Malovec kompilis novan poŝvortaron (vidu informon pri E klubo Brno) krom alie por  UKo Brno, por supozata pli granda intereso pri Esperanto en nia lando.
Informas: M.Malovec 30.8.2024

La informon pri agado de E kluboj, sekcioj, grupoj kaj komisiono preparis L.Chaloupková, 14.2.2025